

# INFORMLETERO

4-a jaro (n-ro 37-38)

"ILO"

Julio/Aŭgusto 1952

Monata informilo por la E-grupoj en Tirolo, Vorarlberg kaj Salzburg.  
Redakcio kaj administracio: Hans Steiner, Augasse 42, Wörgl, Tirolo.

## LA INTERNACIA FESTO EN WÖRGL/Tirol

Inaŭgursolenaĵoj de l'unua Zamenhof-Monumento de Aŭstrio  
26/27 - Julio - 1952

La granda festo honore al nia kara majstro Zamenhof estas pasinta. Kaj ĉiuj, kiuj partoprenis la solenaĵon, devas sincere diri, ke ĝi estis tre bela kaj ĉio bone funkciis. Neniu havis kaŭzon por plendi: ĉiu havis sian loĝejon, sian liton - kaj ĉiuj deziroj laŭeble estis plenumataj. Eĉ Sankta Petro, unu el niaj eksterteraj komitatanoj, favoris la feston per belega somervetero. - Se iuj fakte povis iomete plendi, tiam nur la dancemaj ges-anoj, al kiuj mi pro neantaŭvidita kaŭzo devis "forŝteli" duonan horon de la dancamuzo dimanĉe vespere. Kaj iomete kolerigitaj estis 2 tirolaj s-anoj, kiuj anstataŭ en dezirita gasteja ĉambro devis loĝi en privata ĉambro. Tamen mi esperas, ke intertempe ili ĉiuj grandanime pardonis al mi.

La lastaj preparlaboroj: Ke la semajno antaŭ la monument-inaŭguro por f-ino Kainer kaj mi (la ĝis tiam ununuraj Esperantistoj en Wörgl) estis ega streĉo kaj nervoprovo, certe neniu pridubos. Kelkio devis esti ŝanĝata en la lasta momento, multaj vojoj devis esti farataj plurfoje, diversaj telefonadoj necesis por kunvenigi ĉiujn personojn por la provoj, oficejoj devis interveni por ke ĉio centprocente funkciis en la du fest-tagoj.

La leterportisto alportis tagtage amason da leteroj kaj kartoj kun anoncoj kaj ĉambromendoj; mondonacoj ankoraŭ alvenis, kiujn f-ino Kainer tuj devis konti; telegramo sekvis al telegramo; alvenis jam kelkaj gesam-anoj; la loĝejoide Hans Steiner similis al abelejo. - Resume: ŝajnis, kvazaŭ en la lastaj tagoj ĉio starus surkape.

Du helpemaj spiritoj: Ĵaŭdon, 24-VII tagmeze alvenis en Wörgl du samideaninoj el Vöcklabruck (Supra Aŭstrio), nome s-ino Brünne Lachmayr kaj f-ino Annelies Gammer. Ili tuj transprenis tre grandan laboron nome la adresadon de pli ol 700 bildkartoj de la monumento, el kiuj ĉiu donacinto de almenaŭ 10 S ricevis unu per la poŝto kun la speciala poŝtstampo. - Post tiu ĉi laboro ili tutsolaj ornamis la grandan salonegon en la hotelo Alte Post (malnova poŝtejo). Por tio faris al ni tre bonajn servojn la granda Zamenhofbildo de s-ano Bürger el Linz kaj la multaj pli-malpli grandaj E-flaĝetoj, kiujn pruntedonis al ni s-ano Karl Nigl.

Malagrablaj raportoj: La saman tagon venis telegrame 3 tre malagrablaj raportoj: Federacia Kanceliero D-ro FIGL (Hiobsbotschaften) pro kolooperacio ne povas veni al la inaŭguro --

Dr. Siegfried ZIEGLER el München, nia festparolonto, pro neprokrasteblaj kaŭzoj devis veturi al Norda Germanio kaj tial ne povas veni --- Dr. Anton KARNER grave akcidentis kaj ne povas veni (Li konvulis transpreni la oficon de interpretisto dum la inaŭgura ceremonio).

Tiuj 3 informoj trafis min kiel fulmo el la blua ĉielo. Feliĉe menciis Kanceliero Figl kaj Dr. Ziegler sur la telegramoj, ke ili jam zorgis pro anstataŭantoj

La nigraj nuboj malaperas: Al neniuj mi povas diri, kiel ĝoja mi estis, kiam la 25-VII je 5.45 h matene mia honor-prezidanto Kortega Konsilisto Hugo STEINER en Wörgl alvenis kaj restis tute trankvila ĉe miaj raportoj. Lia nepagebla trankvileco efikis treege je mi, tiel ke ankaŭ mi ree trankviliĝis.

Ĉar Radio-Tirol (Innsbruck) je niaj skribaj petoj, surbendigi partojn de la inaŭgura ceremonio, ne donis kontentigan respondon, Kort.Kons.Hugo Steiner veturis la saman antaŭtagmezon al Innsbruck kaj tie ĉion ordigis, tiel ke Radio Tirol ĉeestis la feston kun siaj aparatoj.

Oni flagornamas: Intertempe alvenis eksprese per trajno 10 diversnaciaj flagoj, kiujn ni tuj pendigis al flagstangoj sur la stacidoma placo. Kaj baldaŭ flirtis tie grandaj flagoj de jenaj nacioj: Francujo, Aŭstrujo, Germanujo, Svislando, Italujo, Egiptujo, Nederlando, Esperantujo, Trieste kaj Belgujo. (La tre imponan E-flagon apud la monumento senkoste pruntedonis al ni s-ano Josef Eder el Graz, ĉiujn aliajn flagojn mi prunteprenis de la firmao "Fahnen-Gärtner", Mittersill, Salzburg, je tre konvenaj prezo kaj kondiĉoj.)

Posttagmeze kaj vespere de l' 25.7. la du Steiner priparolis ankoraŭfoje la unuopajn programerojn kaj verkis kelkajn liniojn por siaj paroladoj.

Se mi nun pri la inaŭgursolenaĵo kaj pri la kun ĝi ligitaj aranĝoj treege detale raportas, mi faras tion pro jenaj vidpunktoj:

- 1) mi volas doni kiel eble plej precizan bildon pri ĉio al jenaj gesamideanoj, kiuj ne povis ĉeesti la feston en Wörgl;
- 2) al la grandnombraj ĉeestintoj mi volas ankoraŭfoje montri ĉiujn detalaĵojn de la vere tre signifa okazaĵo.

26 - VII - 1952

Jam matene flirtis tirola aŭ aŭstria flago de preskaŭ ĉiu domo de la urbo. Grandaj afiŝoj jam dum la tuta semajno invitis la loĝantaron de Wörgl kaj ĉirkaŭaĵo al partopreno ĉe la Zamenhof-Monument-Inaŭguro kaj donis precizan programon. Ĝardenisto anstataŭis la malnovajn florojn ĉirkaŭ la monumento per novaj. Al la stacidoma konstruaĵo estis fiksataj 4 laŭparoliloj por bona komprenado de la paroladoj, la preĝeja servisto belege ornamis la altaron de la urba preĝejo ..... kaj je la 11-a horo oni aŭdis en la preĝejo mallongan provon de operkantisto kaj orgenisto.

Alveno de la verdsteluloj: En la stacidoma halo estis aktivaj jam de la 5a horo matene la ges-anoj Martin Stöckl (Innsbruck), Hermann Visneider (Kufstein) kaj f-ino Kainer (Wörgl) por akcepti la alvenantojn kaj konduki ilin en la loĝejojn.

Posttagmeze alvenis Ministro e.s. Dr.Hans FRENZEL, vicprezidanto de Plejsupera Financkontrollejo kaj prezidanto de Aŭstria Esperantista Federacio. Baldaŭ poste venis la Knittelfeld-anoj kaj ceteraj Stirianoj sub gvido de sia E-landestro s-ro Dr.Adolf HALBEDL, kiuj pro la tre granda partoprenantaro (preskaŭ 40 personoj) kaj la kunportita ŝildo "Esperanto Knittelfeld" faris ne malgrandan sensacion. Por la 19 gejunuloj inter ili mi sukcesis trovi senkostajn loĝejojn ĉe privataj familioj kaj plejgrandparte la gejunuloj eĉ ricevis senkoste la manĝaĵon dum la restado en Wörgl. - Ankaŭ s-ano Föttinger (lerneja direktoro kaj E-landestro) kunvenigis multajn ges-anojn el Salzburg.

Ĉambroj - malfacila problemo: Ankaŭ por tiuj ges-anoj, kiuj ne estis anoncintaj sin, mi povis trovi eĉ vespere ankoraŭ tranoktejon. Kelkaj inter ili komence ja faris longan vizagon,

kiam mi diris al ili, ke ili ree demandu min pri ĉambro ĉirkaŭ la 22a horo, ĉar ĝis tiam mi certe estos trovinta ion por ili. Kaj mi trovis ankaŭ tranoktejojn kaj finfine ankaŭ la lastalveninto havis liton. Jen montriĝis denove, kiel necesege estas ĉe tiaj okazaĵoj, sin antaŭe anonci kaj se tio eĉ lastmomente okazas per telegramo.

### La festkoncerto .

Kvaronon antaŭ la 19a horo haltis sur urba placo du ŝarĝaŭtomobiloj, venintaj el direkto KUNDL. El la aŭtomobiloj eliris la muzikistaro de la najbara vilaĝo KUNDL. Urbestro Kom.Kons. Martin PICHLER akceptis la bele kostumitan muzikistaron kaj diris kelkajn salutvortojn al ili kaj speciale al la talenta muzikestro Rudolf Jessacher. Post tio la muzikistaro marŝis muzikante tra la flagornamita Bahnhofstrasse (stacidoma strato) al la stacidomo. Sekvis granda amaso da muzikamantoj kaj scivolemuoj. Por la Esperantistoj kaj "alikeduloj", kiuj jam estis kunvenintaj sur stacidoma placo, tiu alvenanta procesio estis tre bela surprizo.

Larĝa ringo de aŭskultantoj ĉirkaŭis la muzikistaron dum la festkoncerto, kiu komenciĝis je la 19a horo. Ĉiuj benkoj ĉirkaŭ la verdejo ĉe la stacidoma placo estis plenokupitaj kaj el ĉiuj domoj ĉirkaŭe rigardis gajaj vizaĝoj. La tre specialiste elektita muzikprogramo montris la grandan scipovon de la muzikistaro kaj la ĉiamaj aplaŭdegoj pruvis, ke la koncerto ege plaĉis.

### Amuza vespero - laŭ tirola maniero.

Tro frue fariĝis la 20a h kaj finiĝis la muzika ĝuo proksime al la monumento. Laŭprograme estis je 20.30 h la komenciĝo de l'amuza vespero laŭ tirola maniero en la hotelo Alte Post. Ni marŝis do kune ĉe la sonoj de l'marŝmuziko tra la urbo al la menciita hotelo. Dekstre kaj maldekstre sur la trotuaro spalirstaris granda homamaso, kiu estis logita el la domoj per la muziksono.

Alveninte ĉe hotelo Alte Post la homamaso tuj volis enrapidi en la salonegon por okupi la plej bonajn sidlokojn. Sed ... ho ve ... jen staris du policistinoj en iom stranga, tute ne policistsimila vestaĵo .... niaj festinsigno-vendistinoj Brünne Lachmayr kaj Annelies Gammer asistataj de Fanny Visneider kaj Max Hollinger. Post mallonga grumblado ankaŭ la plej granda kontraŭulo de Esperanto kaptis sian monujon, pagis la 3 ŝilingojn por la festinsigno kaj povis nun senĝene eniri la salonegon - en kio li sen festinsigno tute ne estus sukcesinta.

Jam baldaŭ la salonego estis plenplena ĝis la lasta sidloko, multaj el la lastvenintoj devis eĉ stari, ĉar seĝoj ne plu estis haveblaj. Malantaŭ la "tola kurteno" sur la scenejo oni rimarkis moviĝon, kio pruvis, ke ĉio jam estis preta por komenci.

Estis tempo por komenci kaj tial iris la ĉarma knabino Elfi Messerer en bela tirola kostumo sur la scenejon antaŭ la kurteno por deklami salute kaj enkonduke jenan en E verkitan poemon de Hugo Kraus, kiun la verkinto mem tradukis germanlingven. Elfi deklamis ĝin en ambaŭ lingvoj.

### Himno al Zamenhof

Pli hele, pli klare la vok' al frataro  
Pri am' reciproka sonadas sur ter',  
De lando al land' etendiĝas manparo,  
Salut' bonveniga el kor' kaj sincer' .

Ni por la eterna amika konkordo  
Kun kredo kaj fido, kun vervo kaj ard'  
Nin armas per vorto, inspiras per forto,  
Kolektas nin ĉiujn sub Verda Standard' .

Malhelpa kutimo, la lim' de fremdlando,  
Ne povas nin ĝeni en nia labor',  
Ĉar super la lingvoj la verk' Esperanto  
Malfermas la vojon de koro al kor' .

Al verko de l' Majstro ni ŝuldas honoron,  
Ni ŝuldas fidelon al lia geni' ;  
Do tial dediĉu ni nian fervoron  
Al pac', harmonio, je gloro de li !

#### Hymnus an Zamenhof

Schon heller und klarer tönt über die Erde  
Der Ruf aller Brüder nach Liebe und Licht,  
Als Gruß an die Völker, daß Friede doch werde,  
Der Friede aus Einklang und Menschlichkeitspflicht.

Zu ewiger Freundschaft, zu glücklicher Eintracht,  
Voll Glaube, Vertrauen, mit stürmischer Glut,  
Vereint uns die Fahne, die grüne, aus Ohnmacht  
Zum Worte gewappnet, zu ehernem Mut.

Des Vorurteils Hemmnis, die sprachlichen Grenzen,  
Sie können nicht hindern die friedliche Tat.  
Vom Herzen zum Herzen den Weg uns bekränzen  
Das Werk Esperanto und Zamenhofs Saat.

Wir schulden dem Meister darum unsre Treue  
Und schulden ihm, kämpfend auch nimmer zu ruhn:  
So schwören wir, Meister, Dir folgend, aufs Neue,  
Dein Erbe zu künden zu Ehre und Ruhm!

-----

Nia ĉarma Elfi (Elfriede) rikoltis grandan aplaŭdon, kiun ŝi senenvie meritis.

Post tio parolis la prezidanto de la monument-komitato s-ano Hans STEINER kelkajn salut- kaj bonvenvortojn. Lin sekvis mallonga parolado de la urbestro de Wörgl Kom.Kons. Martin PICHLER, kiu unue elmontris la malfacilaĵojn, kiuj kontraŭstaris la starigon de l'monumento, kaj li rifuzis per trafaj vortoj tiujn eternajn kontraŭulojn de nova afero kaj la kritikulojn, kiuj ĉiam ĉion pli bone volas kompreni kaj tamen ne havas la forton kaj energion, fakte ion krei aŭ efektiviĝi. La urbestro raportis ankaŭ, kiel sukcesis, ricevi por la monumento la plej belan lokon de la urbo. Kaj videbliĝis sur lia vizaĝo grandaj ĝojo kaj fiero pro la venko de la komitato malgraŭ grandaj iamaj - en februaro - atakoj per gazetoj kaj leteroj eĉ anonimaj. - Fortega aplaŭdo dankis al la progresema kaj energia urbestro pro lia forttega subteno de nia afero.

Post kiam ankaŭ nia honorprezidanto Kort.Kons.Hugo STEINER estis parolinta kelkajn salutvortojn, leviĝis la kurteno kaj montriĝis belega bildo: ĉiuj gekantistoj, geĵodlistoj, muzikantoj, gedancantoj kpt. en tirola nacia kostumo formis unu grupon. La gvidantino de tiu ĉi Tirola Vespero, fakinstruistino Herma HASELSTEINER, salutis la ĉeestantojn, klarigis la tutan programon per mallongaj vortoj kaj prezentis la unuopajn grupetojn:

La jam plurfoje premiita knabina ĥoro de la ĉeflernejo en Wörgl kun sia tutnova multkolora tirola kostumo;

La "Marks-Poen" (Marks-knaboj) el Haring, 5 bonegaj blovmuzikantoj;  
Junknaba grupo (Schuhplattler) el Wörgl;  
Kantistino kaj jodlistino Ilse Gasteiger el Kirchbichl;  
Kantisto kaj jodlisto Max Spitzenstätter el Kelchsau (Hopfgarten);  
La muzikistoj Hermann Fusterer (citro) kaj Max Mitterer (gitaro), Wörgl;  
5 kantistoj - junaj instruistoj el Karintio.

Kaj jen komenciĝis la prezentadoj. Ili estis vere bonegaj kaj unikaj. Senpaŭze sekvis programero al programero, la knabinoj kaj knaboj, la junaj virinoj kaj viroj donis sian plej bonon kaj kaptis la aŭskultantaron de komenco ĝis fino per siaj prezentadoj, tiel ke plejmulto de la gesamideanoj kaj gastoj eĉ forgesis vespermangi - ankaŭ mi mem. Oni aplaudis ne nur mane, sed ankaŭ piede. Por ripetado de unuopaj prezentadoj bedaŭrinde ne estis tempo, ĉar la programo, kiun s-ino Haselsteiner kunmetis, estis tiom riĉenhava, ke nek ripetado nek paŭzo estis eblaj.

La diversaj grupetoj donis fakte pli ol ni ĉiuj kuraĝis esperi de ili. Ĉiu - ĉu eksterlandano aŭ aŭstriano - estis tutplene kontentigita, ĉiu aŭdis tion, kion li volis aŭdi dum tielnomata Tirola Vespero. La junaj artistoj estas unĉkaj kaj ĉiu ĉeestinto estis plena de laŭdoj pri ili. Kvankam la grandega salonego kun amplekso de 700 personoj estis plenplena, neniu brueto ĝenis la prezentadojn. Oni nur rimarkis iom ofte la eklumadon de fulmlumoj, kiujn kaŭzis du fervoraj fotografistoj; ili nepre volis bilde reteni diversajn prezentadojn kaj en tio ili tre bone sukcesis.

Je la 23.15 h finiĝis tiuj ĉi ĉarmaj prezentadoj kaj ni forlasis la salonegon nur malvolonte. Multaj ankoraŭ iomete promenis, ĉar estis bel-ega, varma nokto, aliaj nur nun klopodis ricevi vespermanĝon.

(Mi tre bedaŭris la gesam-anojn - inter ili estis ankaŭ f-ino Kainer, s-ino Lachmayr kaj f-ino Gammer - kiuj por akcepti ĉe la stacidomo la malfrue alvenintojn kaj ilin konduki en la loĝejojn aŭ por vendi festinsignojn ne povis vidi la unikajn prezentadojn dum la Tirola Vespero.)

## 27 - a - de Julio

(la tago de l'granda okazaĵo)

Estas la 5-a matene.

La suno sendas siajn unuajn radiojn al la blua ĉielo, neniu nubeto estas videbla. Forteta venteto movas la flagojn, kiuj pendas ĉie de domoj kaj flagmastoj. En la urbo mem ankoraŭ regas silento. Sed sur la stacidoma placo, ĉe la monumento estas jam moviĝo. De pluraj flankoj ili alvenas, la viroj en laborvestoj, kiuj interkonsentis, ke ili precize je la 5-a horo matene volas esti ĉe la monumento, por fari la lastajn laborojn. Oni povis vidi tie la s-anojn Martin Stöckl, Theodor Ohnesorge, Hans Steiner, kaj 3 ŝtonĉizistojn. - Kelkajn minutojn poste eksonas perdotintilo ĉe apuda loĝdomo. La pordo estas malfermata kaj la 6 viroj eniras. Baldaŭ poste ili forlasis la domon kun tre peza ŝarĝo. Ili portas la marmorbuston de nia Majstro, la marmortabulon kaj la kupran florujon por ĉion starigi kaj fiksigi ĉe la destinita loko sur la granitaj monumentŝtonoj. Post tiu ĉi lastlasta laboro s-ano Hans Steiner metas E-flagon sur la buston por kovri ĝin kaj la marmortabulon ĝis la inaŭguro.

Intertempe la unuaj matentraĵoj alvenis en Wörgl kaj per ili multaj gesam-anoj el diversaj direktoj kaj landoj, el proksimo kaj malproksimo. Ili tuj estis kondukataj de la E-Servo al la menditaj ĉambroj, por ĝustatempe esti sur la ĉefplaco.

## Akcepto de la registara anstataŭanto

Kvaronon antaŭ la 9-a horo kolektiĝis sur la ĉefplaco antaŭ la urba preĝejo la festanaro, por atendi la alvenon de la registara anstataŭanto. Iom antaŭ la 9a h proksimiĝas aŭtomobilo kaj ĝin eliras la viclandestro de Tirol s-ro Josef Anton M A Y R el Innsbruck, krome prelato Hieronymus TRIENDEL, abato de la monaĥejo Wilten, kaj ties ceremoniestro.

Urbestro Kom.Kons. Pichler salutas la eminentajn sinjorojn kaj kort. kons.Hugo Steiner prezentas al ili la ĉeestantajn komitatanojn kaj ali-ajn eminentulojn nome (laŭ alfabeto): Rajmund Cech, ministro Frenzel, Hans Jakob, Dir.Kaftan, Therese Kainer, Theodor Ohnesorge, Dr.Riccabona, Hans Steiner, Ludwig Thalmaier.

## La pontifika meso

Post la menciita akcepto ni direktas niajn paŝojn al la ĉefenirejo de la preĝejo, kie al ĉiu eniranto estas transdonata la presita teksto de Schubert-meso kaj dulingva, multobligita programo de la inaŭgur-festo. Tiun ĉi laboron afable transprenis ges-roj Mudrak el Wien. - Niaj gevendantoj de festinsignoj eĉ ĉi tie estas tre fervoraj kaj ŝajnas, kvazaŭ ili neniu volus enlasi en la preĝejon sen festinsigno. - Poste ĉiuj eniras la belege ornamitan grandan preĝejon. Sur la unuaj benkoj kuŝas ruĝaj tapiŝoj kaj tie la loko estis rezervata por la plej altrangaj festvizitantoj. Malantaŭ ili estis lokigataj 3 klasoj da lernejanoj, kiuj fervore sin estis preparintaj por la kantado de la E-kantoj. - Kaj en la postaj benkoj sidis la E-istaro kaj la ceteraj partoprenantoj de la Di-servo.

Jam antaŭ komenco de la solena Di-servo la grandega preĝejo estis tute plena de homoj, el kiuj tre multaj eĉ devis stari, ĉar ne plu estis liberaj lokoj en la benkoj. Ĉiu volis travivi ĉi tiun unikan Di-servon kun E-kantado kaj E-prediko.

Dum la prelato paŝis al la altaro - lin sekvis lia ceremoniestro, la paroĥestro de Wörgl eklezia konsilisto Mathias Riedelsberger, kaplano Ludwig Thalmaier kaj kelkaj messervistoj - eksonis de la ĥorejo fortegaj sonoj de la orgeno, kiun ludis lernejdirektoro Federer. Kaj ĉiu E-isto pli firme tenis sian kanttekston kaj atendis la komenciĝon de la kantado. Jam aŭdiĝis kelkaj enkondukaj taktoj de Schubert-meso tra la sankta ejo - subita silento - kaj jen ekkantis la preĝeja ĥoro de Wörgl: "Al kiu min mi turnu". Tuj same ekkantis la 3 lernejaj klasoj kaj la kantemaj gesamideanoj. Kaj ŝajnis, kvazaŭ la E-istoj speciale akcentus jenajn vortojn de la unua strofo: "... al vi, al vi, ho patro, kun ĝoj' .... mi venas ", ĉar estis fakte ĝojo, ĝojtago por la Zamenhof-anoj. Sekvis kanto post kanto kaj estis vera ĝuo aŭskulti kaj aŭdi, kiel ĉiu sam-ano - ĉu de katolika aŭ de socialista aŭ de komunisto mondpercepto - klopodis beligi per forta kunkantado la Diservon. Kaj la granda ejo resonigis la edifajn melodiojn kvazaŭ la altaj muroj volus ankaŭ kontribui sian parton al la sukceso de la festa solenaĵo.

Kaj poste - post la evangelio - nia altŝatata predikisto, kaplano Ludwig Thalmaier el Gräfelting ĉe Munkeno, iris sur la plej altan ŝtupon de la altaro, laŭtlegis unue la evangelion de l'hodiaŭa tago en E-lingvo kaj poste li komencis la predikon en Esperanto. Li parolis kiel ĉiam, de koro al koro. Li facile trovis la ĝustajn vortojn kaj komparis la universalecon de la katolika eklezio kun la universaleco de la E-ideo kaj li laŭdis la verkon de Zamenhof, kiu helpas krei pacon inter la popoloj. - S-ano Thalmaier ripetis sian predikon, kiun li faris tute parkere kiel ĉiam, ankaŭ germanlingve por la neesperantistoj. (Fotografisto faris belajn fotojn dum la prediko.)



Granda surprizo estis, kiam antaŭ la sankta konsekro aŭdiĝis de la preĝeja ĥorejo la konata kanto de Mozart "Ave verum". Ĝin kantis ŝtata operkantisto el Wiesbaden, la tenoristo Sebastian Feiersinger, kuzo de s-ano Hans Steiner. Dua surprizo sekvis tuj poste, kiam la baritono s-ro Kohler, operkantisto el München en Esperanto kantis la kanton "Die Himmel rühmen des Ewigen Ehre" de Haydn. (Ambaŭ kantistoj venis kiel gastoj por plibeligi nian fest-diservon.)

Post kiam la lasta kanto de Schubert-meso estis kantita, eksonis plej solene la komencaj taktoj de "Te Deum laudamus". Ĉiuj ĉeestintoj leviĝis kaj la ges-anaro ekkantis respektplene: "Granda Di', ni laŭdas vin!" Estis tio kiel dankkanto al la ĉiopova Dio, kiu donacis al ni la hodiaŭan belan tagon kaj la grandiozan solenaĝon sub la devizo: Pacon al la homoj surtere!

### Marŝado al la stacidoma placo.

Antaŭ la preĝejo jam atendis nin la fervojista muzikistaro de Wörgl. Post kiam la eminentuloj enviciĝis tuj malantaŭ la muzikistaro, tiu ĉi ekmuzikis kaj ekmoviĝis. Grandega homamaso sekvis kaj marŝis simile al procesio tra la flagornamitaj stratoj ĝis antaŭ la monumento sur la stacidoma placo, multaj aliaj spalirstaris kaj la fotografistoj ree estis tre aktivaj.

Komence de la procesio, tuj post la muzikistaro, iris la eminentuloj: vic-landestro de Tirol Josef Anton MAYR, distriktestro Dr. Julius RICCA-BONA, urbestro kom.kons. Martin PICHLER, kort.kons. Hugo STEINER, s-ano Hans STEINER, pastro Ludwig THALMAIER, ministro Dr. Hans FRENZEL, redaktoro Hans JAKOB, direktoro KAFTAN, AEF-vicprezidanto Raimund CECH, prof. Dr. CHRISTANELL, Dr. HOHENWARTER, prelato TRIENDL, gimnazia direktoro D-ro SCHWARZER, prof. KLIEN, AEF-landestro Joham SCHWARZ, AEF-landestro D-ro HALBEDL, direktoro kaj E-landestro FÖTINGER, paroĥestro de Wörgl Mathias RIEDELSBERGER, Emilien PROVOST - ĉefo de la francaj trupoj en Kitzbühel, nacia konsilisto kaj vicurbestro de Wörgl s-ro Hans ASTL kun la urba konsilantaro - kaj multaj aliaj eminentuloj esperantistaj kaj privataj.

Je 10.20 h ni jam estis alvenintaj ĉe la monumento. La malmultaj minutoj antaŭ komenciĝo de la inaŭgura ceremonio estis uzataj por ĝuste lokigi la unuopajn grupojn kaj doni al la parolantoj kelkajn informojn. La laŭtparolil-aparataro de Sausgruber (Wörgl) ankoraŭfoje estis provata - (bedaŭrinde ĝi tamen ne tuj funkciis dum la komenca parolado) - kaj ankaŭ la aparataro de Radio Tirol intertempe alvenis kaj lokigis sian mikrofonaĵon ĉe la monumento. - La muzikorkestro intertempe ludis kelkajn marŝojn.

### La inaŭgura ceremonio.

Kiam la montrilo de la granda stacidoma horloĝo montris du minutojn antaŭ la fiksita tempo, prezidanto Hans Steiner diris al la muzikestro, ke ĉio estas preta por la komenco.

Akurate je 10.30 h - la fiksita tempo - eksonis la aŭstria ligohimno. Solena silento regis ĉirkaŭe. Kaj poste paŝis nia honorprezidanto Kort.kons. Hugo Steiner (fondinto kaj prezidanto de IEMW) antaŭ la mikrofonaĵo ĉe la monumento. Li salutis la gastojn, bedaŭris, ke la kanceliero Dr. Leopold FIGL, la protektoro de nia arĝaĝo, pro malgranda operacio estis malhelpata veni, kaj dankis unuavice al la senlaca unua prezidanto de la Monumenta Komitato kaj iniciatinto de la monumento pro lia granda kaj grandioza laboro, ebligi la starigon de la monumento. Li dankis ankaŭ al la verkinto s-ano Theodor Ohnesorge, kiu en plej ideala esperantista maniero donace verkis la buston de nia Majstro, fine li dankis al f-ino Kainer kaj al ĉiuj, kiuj kunlaboris, kaj al la donacintoj de mono el esperantistaj kaj neesperantistaj rondoj.

Kort.kons. Hugo Steiner menciis la alvenon de multaj gratulleteroj de eminentuloj, inter ili de la Kanceliero, instrumministro kaj aliaj. Jen skribis la iama ŝtatprezidanto MIKLAS: " ... kun la plej sincera deziro, ke la Zamenhof-Monument-INAŭguro fariĝu bela kaj inda manifestacio por la eminentaj popolinterligaj ideoj de la kreinto de la Esperanto-movado D-ro Zamenhof sur aŭstria tero, sed ankaŭ vasten en la mondo ...."

Princĉefepiskopo de Salzburg, Primato de Germanujo, D-ro Rohrer: " .... Mi deziras al la aranĝo plej bonan sukceson kaj ne dubas, ke per la nova monumento la E-movado ricevu plifortiĝon en Tut-Aŭstrio. Realiĝu la ideo de la kreinto de la mondhelplingvo, alproksimigi la homojn, ĉiam pli, al kio la praktika uzado de Esperanto povus multon kontribui. Kio koncernas speciale la katolikan E-movadon certe ne estas necese, ke mi memorigu vin, ke Papo Pio X. la 27.6.1906, Papo Benedikto XV. la 20.8.1920 kaj Papo Pio XI. la 11.10.1924 pozitive aprobis kaj benis ĉi tiun movadon ...."

Urbestro de Wien, nia saĝo Franz JONAS: "Aŭstrio dediĉas al la aŭtoro de Esperanto D-ro Zamenhof plenan kaj publikan respekton per monumento. Tiu ĉi fakto instigu ~~xxx~~ la aŭstriajn esperantistojn kaj la gesamanojn en la tuta mondo al nelacigebla laboro por la internacia interkompreniĝo .....

D-ro Kempeneers, vicprez. de UEA: "Mi tre bedaŭras, ke mi ne povas vojaĝi al Wörgl por ĉeesti la inaŭguron de la Zamenhof-Monumento. Okaze de tiu ceremonio mi volas esprimi al vi, tre estimata prezidanto Hans Steiner, al la estraro kaj membroj de Aŭstria E-ista Federacio kaj al la fervora kaj nelacigebla pioniro de Esperanto, kreinto de la Esperanto-Muzeo en Wien, s-ro kort.kons.Hugo Steiner mian altan ŝaton kaj admiron por la sukcesoj akiritaj, kaj por la nuna efektiviĝo de monumento por eterne memoriganta en Wörgl pri la kreinto de Esperanto d-ro Zamenhof. Tiujn sentojn mi esprimas al vi kiel Prezidanto de Reĝa Belga Ligo Esperantista kaj kiel Vic-Prezidanto de UEA ...."

Poste parolis Prezidanto Hans STEINER, la iniciatinto de la monumento, kiu komencis per jenaj vortoj: "Tre estimata festanaro! Mi certe rajtas antaŭe diri, ke hodiaŭ estas la plej bela tago de mia vivo, ĉar mia patruŝo ricevas sian Zamenhof-Monumenton". La iniciatinto plue diris: "Ke tiu ĉi verko sukcesis, ni dankas al la s-ro Kanceliero, kiu estas vera amiko de Esperanto, al la urbestro de nia urbo, kiu senlace malgraŭ atakoj de malamikoj helpis, kaj al la multcentoj da geamikoj, kiuj mondonacis. La tirola s-ano Ohnesorge skulptis kaj donacis la buston. Nia honorprezidanto Kort.Kons.Hugo Steiner ne nur estis honorprezidanto sed nia plej granda kaj oferema kunlaborinto. Preskaŭ mortige akcidentita li resaniĝis mirakle kaj jam post kelktaga restado en la hospitalo lia grandioza energio ebligis al li, helpi al nia laboro. Mi devas sincere diri ĉi tie, ke lia helpo ebligis al ni, honorigi D-ron Zamenhof en tia digna maniero ....., Kaj nun mi petas la s-ron Vic-landestron de Tirol senŝualigi la monumenton."

(La kaŭzo, pro kio ne la landestro de Tirol, agronomkonsilisto GRAUS persone faris la senŝualigan ceremonion, estis jena: la saman tagon okazis la 50-jara ekzistjubileo de Zillertalbahn (Cilerval-fervojo). Kaj ĉar landestro Graus naskiĝis en tiu valo, li nepre devis esti tiel)

Vicestro de Tirola Registaro Josef Anton MAYR iris do al la mikrofono antaŭ la monumento kaj diris:

"S-ro la Kanceliero pro malsano malhelpita persone ĉeesti la hodiaŭan feston, petis min pri sia reprezentanteco. Mi plenumas ĉi tiun peton



despli volonte ĉar temas ja pri mia lando, nia Tirol, kie mi plenumos la senvualigon de monumento por la eminenta filantropo, la elpensinto de Esperanto, D-ro Zamenhof.

Personoj, kiel Dro Zamenhof, kiu donis al la homaro de post jarcentoj sopiritan kaj pro la modernaj transportiloj, per kiuj la popoloj alproksimiĝis tiel tre, urĝe bezonatan interkomprenilon, por ke la popoloj sur la tuta terglobo komprenu unu la alian, informiĝu pri la specialaj ecoj de la aliaj kaj --- respektante la propran gepatran lingvon --- kapablu facile interkompreniĝi pere de facile lernebla lingvo, do de ESPERANTO, kaj per tio veni al vera popolinterpaciĝo --- ne apartenas al unu nacio, sed al la tuta homaro! Tial oni metis en diversaj landoj monumenton al Dro Zamenhof kaj nomis placojn kaj stratojn laŭ li aŭ lia lingvo --- ĉe ni en Wien kaj Graz.

Sed al ni aŭstrianoj ĉi tiu okulkuracisto por la mizeruloj el Varsovio ne estas fremdulo, ĉar li studis okulkuracadon dum la jaroj 1886 kaj 1897 en Wien kaj ĉeestis 1912 al la Oka Universala Kongreso en Krakovo. en tiama Aŭstrio.

Ni germanoj en Aŭstrio, kiuj vivis en bela impona imperio kun 15 aliaj nacioj, bone scias taksu la valoron de komuna lingvo, kiu malutilas al la naciaj sentoj de neniu popolo, sed sole servas al la neceseco de interkompreniĝo. Ni havis sufiĉe da lingvobataloj! Eble tiu bela imperio neniam estus disfalinta kaj al la mondo estus ŝparitaj multaj zorgoj kaj doloroj, se tiam komuna interkomprenilo --- Esperanto --- ĝenerale jam estus estinta enkondukata.

Niaj aŭstria registaroj jam de post 1910 favoris Esperanton. Jen kelkaj datoj: 1910 eldonis la Fervojustro ministerio belegajn ilustritajn gvidlibrojn en E; 1912 la registaro estis reprezentata ĉe la Univ.Kongreso en Krakovo kaj poste ĉiujare ĉe tiuj Esp.-kunvenoj; 1917 lektorato por E en Teknika Altlernejo en Wien, la unua en la mondo; 1923 Viena Foiro propagandis per Esp. kaj la Fremdultrafikoficejoj en Wien kaj Liglandoj sekvis; 1927 kanceliero D-ro Seipel akcelis la fondon de Intern.Esp.Muzeo en Wien, unika tia instituto en la mondo, kiu 1928 estis akceptata en la kadro de la mondfama Aŭstria Nacia Biblioteko kiel speciala, memstara fako. Per favoro de kanceliero Figl la kolektoj de la Muzeo en 1946 estis ordigataj en 5 imponaj salonegoj de nia althonorinda Hofburg en Wien; 1951 en ronda salonego de la Muzeo PANTEONO estis instalata kaj la 17a de aŭgusto 1952 okazos la inaŭguro de KONSTANTA EKSPozicio je memoro al la 25-a datreveno de la fondo; kanceliero Figl kaj instruminstro D-ro Hurdas ankaŭ subskribis la petskribon al UNO.

Mi dankas al la honorprezidanto kort.kons.Hugo Steiner ne nur en la nomo de la kanceliero, sed ankaŭ nome de la tuta lando Tirol, kaj same mi dankas al la iniciatinto de la monumento, nia Hans Steiner, filo de ĉi tiu urbo, kiu plej energie ebligis al ni la inaŭguron de ĉi tiu monumento. Li estas viro, kiu ne nur havas iun ideon, iun planon, sed ankaŭ la forton kaj energion labori kaj batali ĝis la fina sukceso - kaj tiajn virojn ni bezonas."

Post tiuj vortoj la s-ro viclandestro sin turnis al la monumento, suriris la du ŝtupojn, ekkaptis la E-flagon, kiu kovris la buston, fortiris ĝin malrapide de la busto, dirante en E-lingvo jenajn vortojn:

"Kaj nun mi forprenas la Esperanto-flagon de la monumento kaj alvokas al vi: VIVU ESPERANTO! La popoloj enkonduku Esperanton en siajn lernejojn por servi al la bono de la homaro! "

#### La Monumento.

Kaj nun estis antaŭ ni la senvualigita Zamenhof-Monumento: Sur 2 ŝtupoj staras 3 granitkolonoj (1 granda kaj 2 malgrandaj). Sur la granda granitkolono - en la mezo - kuŝas 15 cm dika marmorplato kaj sur ĉi tiu

festp  
E-11

staras en pli ol natura grandeco kaj el brila blanka Carrara-marmoro la bonege verkita busto de nia majstro Zamenhof. Sub la busto - sur la granitkolono- estas fiksita marmortabulo kun jena surskribo per oraj literoj kaj en germana kaj en Esperanta lingvoj: DR. L.L. ZAMENHOF - Er schenkte der Menschheit ESPERANTO. - Li donacis al la homaro ESPERANTON. 1859 - 1917. - Sub la tabulo - sur la dua ŝtupo - staras bele laborita kupra florujo kun belaj floroj. Ankaŭ sur la du malgrandaj granitkolonoj, dekstre kaj maldekstre, staras vazoj kun belegaj floroj. Antaŭ la monumento kuŝas granda Esperanto-stelo kun belega, ĉiamverda musko, kio tre bone kontrastas de la blanka gruzo ĉirkaŭ la monumento. Bela florarango ĉirkaŭas la iom pli ol 3 metrojn altan monumenton je 3 flankoj.

Inaŭgura kanto: Dum kiam ni ĉiuj rigardas la monumenton, regas solena silento - kaj en tiun ĉi silenton eksonas, kantita de la jam plurfoje menciita knabinĥoro sub gvido de s-ino Haselsteiner, bela E-lingva kanto. Ĝin verkis por la inaŭguro s-ano B.Rijpstra el Leeuwarden (Nederlando) laŭ nederlanda popolmelodio. La ĉarmaj knabinetoj en siaj novaj tirolaj kostumoj kantis parkere la tekston en Esperanto kaj germana lingvo. (La tradukon el E germanlingven faris nia tre talenta E-poeto stiria D-ro Karl FRIEDL el Graz). La laŭtparoliloj bonege redonis la tekston kaj la melodion trivoĉan de l'kanto "AL ZAMENHOF":

Laŭdon kantu, laŭdon nun, eksonu nia lir' !  
Al mondo montris vojon la majstra pionir' !  
Honoru ni lian nomon pro nemortanta glor' :  
Granitan monumenton, en nia danko kor' .  
Eksonu la kanto por majstra la aŭtor' !  
Konservu monumenton granitan en la kor' !

Laßt ein Loblied nun erschallen, Leier töne laut!  
Der Meister hat der Menschheit einen neuen Weg gebaut!  
Laßt seinen Namen uns ehren, es steh' zu seinem Ruhm,  
Ein Denkmal aus Granit in uns'res Herzens Heiligtum.  
So töne denn laut der Gesang zu seiner Ehr',  
Das Denkmal im Herzen vergeßt es nimmermehr !

- - - - -

Sekvas mallonga parolado de urbestro de Wörgl, vicprezidanto de Tiro-la Parlamento, Kom.Kons.Martin Pichler. Li priskribis la multajn malhelpojn kaj diris, ke li de komenco deziris helpi al la starigo de la monumento. Li dankis al la honorprezidanto kort.kons.Hugo Steiner kaj al la Prezidanto kaj iniciatinto Hans Steiner. Kaj la urbestro finas en Esperanto per jena frazo: "Nun mi transprenas la monumenton en la gardon de la urbo." - Dume Hugo Steiner malvolvas 3½ m longan dokumenton, kiu enhavas en germana kaj Esperanta lingvoj la historion de la monumento, la nomojn de la honorkomitatoj kaj komitatoj lokaj, la nomojn de ĉiuj donacintoj, krome la subskribojn kaj stampilojn de la aŭstriaĵ protektoro kaj honormembroj kaj de la Loka Komitato, la tutan programon de la inaŭgursolenaĵoj kaj poŝtmarkon kun speciala poŝtstampo.

La urbestro subskribas siajn lastajn vortojn, same subskribas la viclandestro de la Tirola Registaro. Poste prezidanto Hans Steiner rulvolvas la dokumenton, metas ĝin en zinkan ujon kaj poste en truon en la soklo de la monumento. Tiu ĉi truo estis poste fermata per marmora tabuleto kaj ĉirkaŭcementumata.

"Plej ĉarma parto de la tuta ceremonio"

tiel nomis la festanaro tion, kio nun sekvis. Du infanoj en tirola kostumo, Hans Steiner juna (filo de la iniciatinto Hans Steiner) kaj Elfi Messerer stariĝis antaŭ la monumento sur la ŝtupoj kaj deklamis la

festpoemon de Dro. Karl FRIEDL (Graz). La 10-jara knabo deklamis ĝin en E-lingvo, la 12-jara knabino germanlingve. (Tradukis la poemon el la E-originalo la verkisto mem). - Sen timo ia, kun konvinko kaj certeco la juna "Hansi" deklamis antaŭ la mikrofono kaj lin sekvis "Elfi" kun sama kuraĝo kaj kvazaŭ devigante la festanaron, malfermi la korojn por akcepti la belon kaj bonon de Esperanto. La klara kaj preciza parolo kaj akcento de la du ĉarmaj infanoj entuziasmigis nin ĉiujn. Kaj certe ne- niu fotoaparato, el kiuj estis abundo, ripozis en tiu ĉi momento. La egaj aplaŭdoj pruvis, ke la du junaj Esperantistoj venkakiris la korojn de ĉiuj - certe ankaŭ de la eble ĉeestantaj kontraŭuloj. - Jen aŭskultu:

" Festpoemo - de Dro. Karl FRIEDL .

|                                     |                                      |
|-------------------------------------|--------------------------------------|
| Elpensis antaŭ jaroj saĝa viro      | Jardekoj pasis, mortis la noblulo,   |
| Neŭtralan lingvon kun la kordeziro, | Sed la ideo lia kiel brulo           |
| Ke la eterne militanta mondo        | Flamigis ĉiam pli la homajn korojn,  |
| Fariĝu granda familia rondo.        | Li mem ricevis kelkajn jam honorojn. |
| Tre longe sian verkon li elprovis,  | Al stratoj oni donis lian nomon,     |
| Kaj kiam li ĝin aperigi povis,      | Ja, oni eĉ honoras tiun homon        |
| Kaŝigis la hontema homamanto        | Per belaj monumentoj el marmoro,     |
| Sub nomo de Doktoro Esperanto.      | Samkiel vidas vi en nuna horo.       |

Estimas lin malgranda nur anaro,  
Sed fine certe tuta la homaro  
Honoros laŭ merit' la modestulon,  
Doktoron Zamenhof, la grandan geniulon. "

" Festgedicht - von Dr. Karl FRIEDL .

Als ein gar kluger Menschenfreund vor Jahren  
Der Völker Zwietracht Leiden musst erfahren,  
Begann er eine Sprache zu erdenken,  
Die aller Welt den Frieden sollte schenken.

Er opfert' diesem Traum so manche Stunden.  
Als dann die rechte Lösung war gefunden,  
Trat seine Sprache, endlich freigegeben,  
Als Doktor Esperanto's Werk ins Leben.

Jahrzehnte kamen und Jahrzehnte gingen.  
Der Edle starb. - Doch die nun weiterringen  
In seinem Sinn, sieht ständig man sich mehren.  
Ihn selbst beginnt man immer mehr zu ehren.

Man gab schon Strassen, Plätzen seinen Namen,  
Und wir, die heute hier zusammenkamen,  
Sah'n, dass für ihn ein Monument erstanden,  
Als erstes dieser Art in uns'ren Landen.

Noch sind's nicht viele, die ihn kennen,  
Die seinen Namen voller Achtung nennen,  
Doch wird dereinst weltweiter Ruhm umstrahlen,  
Ihn, Doktor Zamenhof, den genialen. "

- - - - -

La parolintoj: S-ano OHNESORGE, la verkinto de la busto, nun diris per kelkaj vortoj, ke li estas ĝoja, se lia verko al

la ĉeestantoj plaĉas. Kaj liaj brilantaj okuloj malkaŝis al ni, ke la ju-  
na artisto en tiu ĉi momento vere estis tre tre feliĉa. Kaj li fakte po-  
vis esti fiera pro sia granda verko.

Sekvis kelkaj vortoj de s-ro Emilien PROVOST, ĉefo de la francaj oku-  
padtrupoj en la distrikto Kitzbühel, kiu reprezentis la komendanton de la  
francaj trupoj en Aŭstrio. Li akcentis, ke ankaŭ la franca registaro sub-  
tenas la Esperanto-movadon.

Redaktoro Hans JAKOB el Genève transdonis la salutojn de UEA-estraro  
kaj esprimis sian ĝojon, ke li povis ĉeesti ĉi tiun belan aranĝon, kaj  
gratulis kaj dankis al ĉiuj, kiuj helpis al la vere bonega sukceso. Spe-  
ciale li dankis al la du Steiner.

Sekvis la reprezentantoj de Belgujo, Francujo, Italujo, Nederlando,  
Germanujo, Svislando, Trieste kaj Egiptujo, kiuj transdonis la salutojn  
de sia landa E-organizo. - Por Belgujo parolis s-ano DAEMS, Bruselo; por  
Egiptujo s-ano LUNZER, Alexandria; por Francujo s-ano LABIT, Tourcoing;  
por Germanujo s-ano D-rino LEUBNER, München; por Italujo kaj ankaŭ en  
la nomo de s-ro Giuseppe Chiostergi, prezidanto de la Itala Parlamento,  
parolis prof. Campetti el Lucca; por Nederlando s-ano PLAIZIER, Rotter-  
dam; por Svislando s-ano WALDER Otto, Romanshorn; por Trieste s-ano ROSE.

Por la aŭstria esperantistoj parolis s-ano Ministro e.s. Dro. Hans  
FRENZEE, prezidanto de Aŭstria E-ista Federacio. Li esprimis sian ĝojon,  
ke en Aŭstrio estiĝis tiu ĉi monumento kaj dankis al la registaro, al la  
urbestro, al la honorprezidanto kaj al la iniciatinto prez. Hans Steiner  
kiel ankaŭ al la artisto Ohnesorge kaj al ĉiuj, kiuj kontribuis al la bo-  
nega sukceso.

#### La festparolado.

Anstataŭ la malhelpita prez. de Germana E-Asocio D-ro Siegfried Zieg-  
ler faris la festparoladon s-ano kaplano Ludwig Thalmaier el München.

Lia simpatia maniero, alparoli la homojn tiel, ke la vortoj devas en-  
penetri la korojn, kaj la treege altnivela enhavo de la parolado, gajnis  
tuj ĉies simpatian kaj kelkiu diris al mi post la festo: "Tiu ĉi pastro  
povus eĉ el mi fari alian homon, ĉar lin certe neniu povas kontraŭstari."

Post la festparolado - je 11.45 h - finis la inaŭgura ceremonio per  
la E-himno, ludita de la muzikorkestro fervojista kaj kunkantita de la  
E-istaro.

#### Radio-intervjuo kaj festmanĝo.

Dum kiam la eminentuloj iris en la manĝosalonon (unua klaso) de la  
apuda stacidoma restoracio kaj la ceteraj ges-anoj kaj festgastoj en la  
gastejojn, hotelojn aŭ loĝejojn, Radio Tirol surtonbendigis intervjuon  
kun kort.kons.Hugo Steiner. Partoj de la inaŭgura solenaĵo jam troviĝis  
sur tonbendo. - Radio Tirol disaŭdigis la reportaĵon dum kvaronhoro de 1'  
sama tago enkadre de la sendaĵo "Hörberichte aus Tirol" inter 19 - 19.15  
h. (Ni aŭdis ĝin dum nia ekskurso en strandkafejo de Walchsee.)

La festmanĝon partoprenis jenaj 15 eminentuloj: Viclandestro de Tirol  
Josef Anton Mayr, abato Hieronymus Triendl, urbestro kom.kons.Martin Pich-  
ler, ĉefo de la francaj trupoj Emilien Provost, distriktestro D-ro Julius  
Riccabona, redaktoro Hans Jakob, kaplano Ludwig Thalmaier, komercisto  
Franz Feiersinger, s-ano Ohnesorge, afergvidanta prez. de AEF oficeja kon-  
silanto Rajmund Cech, ceremoniestro Augustin Bruck, fakinstruistino Her-  
ma Haselsteiner, f-ino Therese Kainer, honorprez.kort.kons.Hugo Steiner,  
prezidanto Hans Steiner. (Ministro Dr.Frenzel bedaŭrinde jam je la 11.50  
horo devis forveturi kaj tial ne ~~povis~~ povis ĉeesti la festmanĝon.)

la ĉeestantoj plaĉas. Kaj liaj brilantaj okuloj malkaŝis al ni, ke la juna artisto en tiu ĉi momento vere estis tre tre feliĉa. Kaj li fakte povis esti fiera pro sia granda verko.

Sekvis kelkaj vortoj de s-ro Emilien PROVOST, ĉefo de la francaj okupadtrupoj en la distrikto Kitzbühel, kiu reprezentis la komendanton de la francaj trupoj en Aŭstrio. Li akcentis, ke ankaŭ la franca registaro subtenas la Esperanto-movadon.

Redaktoro Hans JAKOB el Genève transdonis la salutojn de UEA-estraro kaj esprimis sian ĝojon, ke li povis ĉeesti ĉi tiun belan aranĝon, kaj gratulis kaj dankis al ĉiuj, kiuj helpis al la vere bonega sukceso. Speciale li dankis al la du Steiner.

Sekvis la reprezentantoj de Belgujo, Francujo, Italujo, Nederlando, Germanujo, Svislando, Trieste kaj Egiptujo, kiuj transdonis la salutojn de sia landa E-organizo. - Por Belgujo parolis s-ano DAEMS, Bruselo; por Egiptujo s-ano LUNZER, Alexandria; por Francujo s-ano LABIT, Tourcoing; por Germanujo s-ano D-rino LEUBNER, München; por Italujo kaj ankaŭ en la nomo de s-ro Giuseppe Chiostergi, prezidanto de la Itala Parlamento, parolis prof. Campetti el Lucca; por Nederlando s-ano PLAIZIER, Rotterdam; por Svislando s-ano WALDER Otto, Romanshorn; por Trieste s-ano ROSE.

Por la aŭstriaĵ esperantistoj parolis s-ano Ministro e.s. Dro. Hans FRENZEE, prezidanto de Aŭstria E-ista Federacio. Li esprimis sian ĝojon, ke en Aŭstrio estiĝis tiu ĉi monumento kaj dankis al la registaro, al la urbestro, al la honorprezidanto kaj al la iniciatinto prez. Hans Steiner kiel ankaŭ al la artisto Ohnesorge kaj al ĉiuj, kiuj kontribuis al la bonega sukceso.

#### La festparolado.

Anstataŭ la malhelpita prez. de Germana E-Asocio D-ro Siegfried Ziegler faris la festparoladon s-ano kaplano Ludwig Thalmaier el München.

Lia simpatia maniero, alparoli la homojn tiel, ke la vortoj devas penetri la korojn, kaj la treege altnivela enhavo de la parolado, gajnis tuj ĉies simpatian kaj kelkiu diris al mi post la festo: "Tiu ĉi pastro povus eĉ el mi fari alian homon, ĉar lin certe neniu povas kontraŭstari."

Post la festparolado - je 11.45 h - finis la inaŭgura ceremonio per la E-himno, ludita de la muzikorkestro fervojista kaj kunkantita de la E-istaro.

#### Radio-intervjuo kaj festmanĝo.

Dum kiam la eminentuloj iris en la manĝosalonon (unua klaso) de la apuda stacidoma restoracio kaj la ceteraj ges-anoj kaj festgastoj en la gastejojn, hotelojn aŭ loĝejojn, Radio Tirol surtonbendis intervjuon kun kort.kons.Hugo Steiner. Partoj de la inaŭgura solenaĵo jam troviĝis sur tonbendo. - Radio Tirol disaŭdis la reportaĵon dum kvaronhoro de la sama tago enkadre de la sendaĵo "Hörberichte aus Tirol" inter 19 - 19.15 h. (Ni aŭdis ĝin dum nia ekskurso en strandkafejo de Walchsee.)

La festmanĝon partoprenis jenaj 15 eminentuloj: Viclandestro de Tirol Josef Anton Mayr, abato Hieronymus Triendl, urbestro kom.kons.Martin Pichler, ĉefo de la francaj trupoj Emilien Provost, distriktestro D-ro Julius Riccabona, redaktoro Hans Jakob, kaplano Ludwig Thalmaier, komercisto Franz Feiersinger, s-ano Ohnesorge, afergvidanta prez. de AEF oficeja konsilanto Rajmund Cech, ceremoniestro Augustin Bruck, fakinstruistino Herma Haselsteiner, f-ino Therese Kainer, honorprez.kort.kons.Hugo Steiner, prezidanto Hans Steiner. (Ministro Dr.Frenzel bedaŭrinde jam je la 11.50 horo devis forveturi kaj tial ne ~~povis~~ povis ĉeesti la festmanĝon.)

Ĉiuj partoprenantoj al la festeno enskribis siajn nomojn kaj rangon en la gastlibron de la "E-grupo" Wörgl. - Poste ili iris refoje al la monumento por tie esti kune fotografataj. (La bildo bonege sukcesis).

### Aŭtobusa ekskurso ĉirkaŭ la Kaiser-montaron.

Posttagmeze la E-istoj kaj multaj aliaj interesuloj iris en la salonegon de l'hotelo Alte Post, por tie vidi la laŭprograme anoncitan unuan prezentadon de la starfilmo "25 jarojn Internacia E-Muzeo en Wien". Bedaŭrinde la prezentado devis esti prokrastita ĝis la vespero pro tro malbona malheligo de la salonego.

Nun iris tiuj, kiuj volis partopreni la aŭtobusan ekskurson, al la trafikburoo, antaŭ kiu la aŭtobusoj atendis. Post kiam la 3 aŭtobusoj estis plenaj kaj ankaŭ la ĉarmaj kantistinoj kun sia instruistino Haselsteiner kaj krome Elfi kaj Hansi estis senkoste lokigataj en la aŭtobusoj, ni ekveturis je 15.30 h .

Belega estis la veturo en tiu ĉi sunplena somerposttagmezo. Dekstre kaj maldekstre de ni salutis la odorantaj abiarbaroj, kaj maldekstre al ni alvokis sina bonvensaluton la krutaj rokopintoj de l'Kaiser-montaro.

Ni traveturis jenajn vilaĝojn: Bruckhäusl, Söll, Scheffau, Ellmau, Going, St.Johann, Kirchdorf, Walchsee, Rettenschöß, Niederndorf, Ebbs, la urbon Kufstein kaj Kirchbichl.

En Ellmau ĉe la stratdisiĝo la 3 aŭtobusoj atendis la aŭtomobilojn de viclandestro Mayr kaj de distriktestro Dr.Riccabona, kiuj kune kun la abato Triendl, ties ceremoniestro kaj la urbestro Pichler jam ekde Wörgl estis antaŭveturintaj por unue rigardi la lagon de Hinterstein. Nia renkontejo estis la stratdisiĝo ĉe Ellmau, renkont-tempo 16 h. Kelkajn minutojn post ni tie alvenis la du aliaj aŭtomobiloj. Ni ĉiuj veturis ĝis arbarrando kaj iris en jam falĉitan grajnkampon por fari komunan fotobildon. Estis tre pitoreska bildo en ĉi tiu libera naturo: enmeze de granda grupo da E-istoj kaj gastoj staris la eminentuloj, antaŭ ili en multkolora tirola kostumo la Haselsteiner-knabinoj kaj malantaŭ ni parto de Tirolo - la tre impona kaj pitoreska Kaiser-montaro en sia tuta beleco. - Kaj kiam nun la junaj kantistinoj ekkantis belan tirolan kanton, ni ĉiuj - la en-kaj eksterlandanoj - sentis nin ligitaj kun la naturo, kun la allogaj tirolaj montoj.

Poste ni daŭrigis la vojaĝon kaj sekvis per niaj aŭtobusoj al la du pli rapidaj aŭtomobiloj, kiuj nin atendis en Walchsee. Estis jam preskaŭ la 18-a horo, kiam ni tie alvenis; tial ni decidis, resti ĉi tie ĝis post la Radio-reportaĵo, kiun ni ankaŭ fakte aŭdis, kvankam kelkfoje forta krakado forprenis al ni belajn partojn de la reportaĵo.

Nia sekvonta celo estis Kufstein, kie ni alvenis iom antaŭ la 20a h. Ĉe la stacidomo forlasis nin niaj karaj gesam-anoj kaj gastoj el München kaj aliaj germanaj urboj. Ankaŭ la 2 aŭtomobiloj kun la altrangaj personoj forlasis nin por iom pli frue hejmenveni. Post aŭskultado de la ludado de la heroo-orgeno en la fortikaĵo Kufstein ni finfine revenis al Wörgl iom antaŭ la 21 h .

La ges-anoj kaj gastoj, kiuj ne partoprenis la ekskurson aŭtobusan, jam sopire atendis nin kaj esperis, ke nun tuj komenciĝos la dancado. Bedaŭrinde mi devis seniluziigi ilin, ĉar antaŭe okazis la prezentado de l'filmo "25 jarojn IEMW". Kort.kons.Hugo Steiner klarigis ĉiujn bildojn germanlingve. Je 21.30 h tio finiĝis - kaj nun ĉiuj ekdancis kaj daŭrigis ĝin ĝis noktomezo. (Nur kelkaj AEF-estraranoj - Cech, Eder, Höfert, Dr.Halbedl, Schwarz, Nigl - intertempe kunsidis en gasteja ĉambro, por preparoli gravan aferon, nome AE-Revuo kaj la liglandaj bultenoj - La Spegulo, Voko el Stirio, Informilo el Malsupra Aŭstrio kaj Informletero -).



Kiel ĉio, tiel ankaŭ la festo en Wörgl finiĝis. Ĝi kaŭzis al la aranĝintoj multege da laboro kaj nervostreĉoj - sed finfine tre multe da ĝojoj kaj laŭdoj -- kaj ankaŭ la ĉeestintaj geseanoj el Aŭstrio kaj eksterlando tre ĝojis pri la bonega sukceso. La efiko de la solenaĵoj estis granda, ĉar en tuta Aŭstrio la Radio kaj la gazetaro jam raportis pri la Zamenhof-Monument-Inaŭguro en Wörgl kaj tio denove atentigis la aŭstrian publikon pri la E-movado. Certe ankaŭ eksterlandaj gazetoj ion raportos. Neniu povis antaŭe imagi, ke la inaŭgursolenaĵo kaj la aliaj aranĝoj estos tiel belaj kaj ke ĉio tiel bonege funkcios.

Speciala poŝtoŝtampoj: La 27-VII-1952 inter la 8-a kaj 16-a h funkciis speciala poŝtoŝtampoj en Wörgl, kiu estis markita per belaj grandaj elpendaĵoj. Ĉiuj poŝtaĵoj, kiuj estis transdonitaj en la markita ĝiĉeto, estis stampataj per speciala poŝtstampo, kiun la ĝeneraldirekcio de la aŭstria poŝtadministracio senkoste disponigis. La teksto de la speciala poŝtstampo en germana kaj E-lingvoj estis jena: Inaŭguro de D-ro L.L. Zamenhof-Monumento en Wörgl, Aŭstrio - 27.7.1952.

La 4 ĝiĉetoficistoj estis plene okupataj, ili devis stampi proksimume 5000 poŝtaĵojn per la speciala stampo. - En- kaj eksterlandaj gesamanoj tre laŭdis la afablecon de niaj poŝtoŝtampoj.

Nia festinsigno: Sur silka rubando troviĝas la busto de Zamenhof laŭ la pentraĵo en la PANTEONO de IEMW. La teksto en germana kaj E-lingvoj estas jena: Zamenhof-Monument-Inaŭguro, Wörgl, Tirol, 27.7.1952. - La festinsignoj - belega gobelenlaboraĵo - estis vendataj preze de 3 aŭstriaĵoj ŝilingoj kaj rajtigis al senkosta eniro ĉe ĉiuj aranĝoj la 26. kaj 27.7.1952 okaze de la inaŭgursolenaĵoj.

Elkoran dankon! Kiel prezidanto de la Monument-Komitato estas mia koredeziro, refoje danki al ĉiuj, kiuj efike kunhelpis ĉe la starigo de la monumento. Mia danko koncernas unuavice al nia honora prezidanto kort.kons.Hugo Steiner, al la skulptisto Ohnesorge kaj al la kasistino f-ino Kainer. Plue mi plej kore dankas al nia protektoro s-ro kanceliero Dr.Figl, al la s-ro urbestro Pichler kaj al la ceteraj komitatanoj, al viclandestro Mayr, al la prelato Triendl, al kaplano Thalmaier, al ministro Dr.Frenzel, al la gesanoj de la E-Statodoma Servo, al la gevendintoj de la festinsignoj, al s-ino Haselsteiner kaj al ĉiuj ŝiaj kunlaborintoj, al s-ino Lachmayr kaj f-ino Gammer. Mia speciala danko koncernas ĉiujn donacintojn de mono aŭ konstrumaterialo kaj ne laste la donacinton de la E-tekstoj por Schubert-meso, honorkartoj ktp. - Mi dankas al vi ĉiuj, karaj geamikoj, kiuj venis el proksimo kaj malproksimo aŭ letere anoncis vian spiritan ĉeeston ĉe nia festo. Al vi ĉiuj mian plej koran dankon! - La vere grandioza solenaĵo honore al nia Majstro kaj la efika propagando por nia sankta afero estu la rekompenco por la vere frateca kaj harmonia kunlaboro de ĉiuj! - VIVU ESPERANTO !

- - - - -

Erarkorekto: La kanto "Die Himmel rühmen des Ewigen Ehre" ne estas de Haydn sed de Beethoven. -

Pardonu la malfruan alsendon de la ILO ! Jen la kaŭzo: Multaj gesanoj post la inaŭguro buŝe aŭ skribe konsilis al mi preni libertempon kaj fine ripozi. - Kaj tion mi faris.

Venonta "ILO" (duobla numero) aperos meze de Oktobro kun gravaj sciigoj.

Belegaj fotobildoj (kartformato) pri la inaŭguro ktp. preze de 3 S estas riceveblaj per mia adreso. - Mendu tuj! -

---

Herausgeber, Verleger und für den Inhalt verantwortlich:  
Hans Steiner, Augasse 42, W ö r g l , Tirol, Aŭstrio.

---